

NEFORGESEBLA TUTMONDA EKZAMENTAGO EN SUBOTICA, LA 30-AN DE MAJO 2015

Informojn pri la **4-a Tutmonda ekzamentago 2015** mi jam trovis en la retportalo »Edukado.net«. Kiel serioza pledanto de esperanta movado mi rapide decidiĝis por ekzameno en la serba urbo Subotica. De s-rino Aranka Laslo, kunlaborantino de Katalin Kovats (ŝi estas la ĉefa persono por la projekto de UEA, KER-ekzameno kaj tre diligenta fonto de gravaj informoj el la Edukado.net; KER signifas: Komuna Eŭropa Referenckadro) kaj sekretario de Esperanta societo »Tibor Sekelj« Subotica, mi poste ricevis agrablan invitilon al la ekzameno. Kun Aranka mi ankaŭ kelkfoje interparolis Skajpe.



Vojaĝ-paŭzo al Subotica (Anton, Reneja, Nika kaj Davorin)

Mi por la ekzameno ekinteresis miajn geamikojn Davorin Juraĉ el la urbo Prevalje (nord-okcidenta Slovenio), kaj Nika Rožej, prezidantino de Esperanto-societo Ljubljana (la ĉefurbo de Slovenio), kun kiuj mi interŝanĝis kelkajn ekzercojn por ekzameno, skribe kaj Skajpe. Kun mia edzino Reneja ni kune veturis al Subotica jam la 29-an de majo kaj dum la vojaĝo ni gaje interparolis pri diversaj aktualaj temoj, kompreneble, ankaŭ pri la esperanta ekzameno, esperanta movado ĝenerale, ktp. Reneja, kiu tre diligente subtenis tutan »slovenan ekzamen-delegacion«, ŝoforis tutan vojon ĝis Subotica kaj ankaŭ inverse.

En Studenthejmo en Subotica ni estis tre bovenigitaj. Tie ni dufoje tranoktis kaj ankaŭ manĝis. Ejoj en la domo estis tre puraj kaj personaro estis afablaj.



En Studenthejmo en Subotica ni estis tre bonvenitaj (de maldekstra flanko: Bulgarino Ginka Dilova, Aranka Laslo, Anton Miheliĉ, Nika Rožej kaj Davorin Juraĉ)

Sabate, la 30-an de majo, okazis la ekzamentago en Politeknika lernejo Subotica. Estis 10 ekzamenkandidatoj el Slovenio, Serbio kaj Bulgario. Jam antaŭ la ekzameno mi donacis mallongan deklaron por unu el serbaj lokaj telivideoj pri mia E-klubo kaj pri kaŭzoj por mia ekzameniĝo. Ni ĉiuj kune ankaŭ fotiĝis. Gesinjoroj Aranka Laslo kaj Mac Gill, viceprezidanto de UEA, malfermis kovertojn kun ekzamen-test-folioj por ekzamen-niveleoj B1, B2 kaj C1, kaj skriba parto de la ekzameno komenciĝis.



Mi donis la mallongan deklaron

Post ĉirkaŭ kvarono horo ni en alia ejo daŭrigis kun aŭdkomprena parola parto de la ekzameno. Aŭditajn du tekstojn mi komprenis malbone. Preskau ĉiuj ekzamenkandidatoj diris, ke tiu parto estis la plej malfacila. En tria ejo mi interparolis kun s-ino Katalin. Mi devis paroli pri elektitaj bildo kaj situacio. Poste ni ĉiuj estis informitaj, ke ni sukcese faris tiun parton de la ekzameno. Dum tuta tempo de ekzamenokazaĵo tieaj organizantoj zorgis por trinkajeto kaj manĝajeto. Ankaŭ funkciis libroservo kun hungaraj, serbaj kaj esperantaj libroj.



Kuna fotoĵo antaŭ la ekzameno

Post la ekzameno ni havis kunan tagmanĝon en la studenthejmo. Kio estis poste? Poste okazis neforgesebla solena programo ĉe fino de la ekzamentago. Ĉeestis ankaŭ aliaj. Ĉiuj ni kune kantis Himnon de Eŭropo kaj kelkajn aliajn konatajn popolajn kaj amuzajn kantojn. Per akordiono akompanis nin vigla Ĝulio Dietrich .Belegan

muzikan parton de la programo faris simpatikaj fraŭlinoj Blanka Laslo sur violonĉelo, Esther Duerinck (el Belgio, kiu unu jaron pasigas en Subotica, en la Muziklernejo, pere de studentoŝanĝa programo) sur violono kaj Anet Garamvelĝi kun liuto.



La ekzameno komenciĝis (Aranka Laslo kaj Mac Gill malfermis kuvertojn)

Mi havis mallongan prelegon pri agado de la Esperanta klubo de Posavje (EKP) kaj pri la venonta Internacia Amika Esperanta Renkontiĝo - IAER en Brežice, sud-orienta Slovenio. Mac Gill prelegis pri unu el la plej novaj UEA- projektoj. John Derks, redaktoro de la nova revuo »Balkana Verda Stelo«, klarigis la manieron por mendi ĝin.



Fina pozado de ĝeamikoj

Nia »delegacio« donacis al Aranka kaj al Esperanto-societo »Tibor Sekelj« Subotica la signojn kun surskribo »Mi parolas Esperanton«, kelkajn librojn el biblioteko de la EKP, unu butelon da ŝaŭma vino de la speciala »Kelo de ŝaŭmaj vinoj Isteniĉ« el slovena turisma regiono Bizeljsko, du hejme faritajn rozfrukta kaj ĉeval-kaŝtanajn kremojn – produktojn de Reneja, kaj specialan floranĝon de Nika.

Fine ni kune fotiĝis por longa memoro al tio tre sukcesa renkontiĝo.

Dum trarigardo de la urbo la slovena grupo fotiĝis sub la memora plato, kiu estas dediĉita al Tibor Sekelj – verkisto, monda vojaĝanto kaj fama esperantisto. Ni sentis afablan vojvodinan kaj hungaran pulson de urbo.





»Slovena ekzamen-delegacio« sub la memora plato de Tibor Sekelj

Dum nia restado kaj partopreno en Subotica estiĝis multaj amikaj rilatoj kaj ni ĉiuj kontente disiĝis kaj solene promesis, ke ni ankoraŭ iam renkontiĝos, eble ĉe la iu nova pli alta ekzameno. Mi devas diri, ke la kunveno en Subotica signifis bonegan ekzemplon kiel antaŭenigi Esperanton en esperanta kaj neesperanta publiko, precipe inter junularo.

Pli gravaj retadresoj, konektitaj kun okazaĵo en Subotica:

- ✓ La intervjuo kun Katalin Kovats pri la projekto »Tutmonda KER-ekzameno«:
<http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/9867410>.
- ✓ Mia intervjuo kaj aliaj pli gravaj informoj pri okazaĵo en Subotica
<http://www.yueco.rs/vest/dru-tvo/polaganje-ispita-iz-esperanta-u-politehni-koj-koli>.
- ✓ Pri la tuta solena kunveno kun mia kontribuo:
https://www.youtube.com/playlist?list=PLOZ3mrqOLGJ5jCDTA1hcD9frvIJZXxDi-&wl_id=oYV5A610Rsl&wl_token=p9L_c6rRe33qR06msYHq9k7SNWd8MTQzMzM2ODUwMEAxNDMzMjgyMTAw
- ✓ Aranka Laslo en la loka televida stacio TV X – Info Kanal Subotica:
https://www.youtube.com/watch?v=8-TTex_scSM (anoncita en la retportalo edukado.net)
- ✓ Aranka Laslo en la loka televida stacio K-23:
<https://www.youtube.com/watch?v=CvvWyXJcyCE&feature=youtu.be> (anoncita en la retportalo edukado.net)
- ✓ Bildaj materialoj en retpaĝo de la Esperanto-societo »Tibor Sekelj« Subotica:
<https://www.facebook.com/esperantosocieto.tiborsekelj?fref=ts>

Fotgalerio:



Teksto: Anton Mihelič
Foto: diversaj fontoj